

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia februara kunveno

DATO: Vendredon, la 18-an de februaro 2005, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Susan Polgar, mond-ĉampiono de ŝak-ludo,
ankaŭ esperantisto, prelegos pri sia vivo kiel
profesia ŝakisto, kaj pri sia rilato kun Esperanto!

Post la prelego, demandoj kaj respondoj sekvas. La prelego estos en la angla lingvo (do invitu viajn ne-esperantistajn gamikojn). La demandoj kaj respondoj estos en Esperanto. ★

Grandmaster Susan Polgar



4-time World Chess Champion
and 5-time Olympic Champion

First woman in history to break
the gender barrier in chess

<http://www.polgarchess.com>

Protokolo de la kunveno de la 21-an de januaro 2005

de Jeff Blakeslee

Antaŭ la formala komenco de la kunveno, je proksimume 6:45 ptm, nia grupo estis vizitata de la verkisto Geoff WOLINETZ, kiu klarigis, ke li verkas artikolon pri Esperanto por la reta revuo *The Black Table* (www.blacktable.com). Li legis pri Esperanto en la angla Vikipedio, kaj volis lerni pli pri nia lingvo kaj movado. S-ro WOLINETZ intervjuis nin en la angla kaj faris al ni multajn interesajn demandojn. Li restis dum la unua parto de la formala kunveno.

Je 7:19 ptm nia nova prezidanto Stuart GREEN malfermis la kunvenon. Ĉeestis dek unu personoj inkluzive nian gaston. Stuart bonvenigis ĉiujn al la januara kunveno. Li esprimis bonajn dezirojn al Jeff BLAKESLEE, la nova protokolisto. Ankaŭ, li dankis Thomas LEONG pro lia servo kiel vic-prezidanto. La grupo esprimis al Stuart varmajn dezirojn por sukceso en lia nova posteno.

S-ro WOLINETZ formale prezentis sin kaj dankis nin pro la okazo de intervui nin kaj viziti la kunvenon. Stuart proponis al la ĉeestantoj, ke ili prezentu sin en Esperanto al nia gastoj. Ni ĉiuj prezentis nin, kaj Stuart tradukis niajn prezentadojn en la anglan por nia gastoj. Pilar RAU donacis diskon de sia filmo, kiun ni spektis pli poste, al s-ro WOLINETZ.

Je 8:00 ni diskutis pri eraroj en la *Novjorka Prismo* de januaro. Oni konstatis, ke ne estis menciita Jesse HEIWA kiel ĉeestanto ĉe la decembra kunveno. An-kaŭ, Arturo BONETTI kaj Marta BERGONZOLI rimarkis, ke iliaj nomoj ne troviĝas en la listo de pagintaj anoj de la Societo por 2004, kvankam ili ja pagis.

Sekvis kelkaj anoncoj. Stuart anoncis, ke la retpaĝo de nia Societo estas nun ĝisdatigita per la aldono de nova foto (de la decembra Zamenhofa festo) kaj ankaŭ la nomoj de la nova estraro. Due,

li anoncis, ke li ricevis poŝtkarton en Esperanto de japana infano. Li klarigis, ke Maki SANO antaŭe petis al li kaj al aliaj societanoj sendi al ŝi siajn poŝtadresojn. Ŝi sendis la adresojn al amikino en Japanio, kiu instruas kurson de Esperanto al infanoj. La infanoj skribis agrablajn poŝtkartojn reen kun bildoj de sia urbo en Japanio.

Poste, Maki anoncis ke ŝi komunikigis kun Susan POLGAR, kiu estas la unua grandmajstrino de ŝako, la plej alte rangita ŝakistino, kaj membro de
(daŭras sur paĝo 2)

Protokolo (daŭras de paĝo 1)

nia Societo. S-ino POLGAR konsentis veni al nia februara kunveno por prelegi pri sia kariero en ŝako. Ŝi komencos la prelegon je la 7-a horo ptm kaj parolos plejparte en la angla lingvo.

Krome, Tomaso ECCARDT anoncis, ke finna esperantisto venos al Novjorko kun sia edzino por viziti la tombon de sia patro en la Calverton-a tombejo. Li diris, ke ili gastos en la hotelo Roosevelt dum la lasta semajnfino de januaro.

Plue, Arturo menciis, ke tiu tago (la 21-a) estis lia naskiĝtago. La grupo esprimis al li dezirojn de feliĉa naskiĝtago.

Post la anoncoj, ni spektis kelkajn filmojn en kaj pri Esperanto. La unua estis farita de Pilar RAU, kun la titolo *Tomaso la Instruisto*. Ĝi montris Tomason instruantan sian Esperanto-kurson en la novjorka restoracio Emma's Dilemma, kaj inkluzivis intervjuon de li en la angla lingvo.

Poste ni spektis partojn de du litovaj filmoj en Esperanto. La unua estis pri la litova urbo Kaunas. En ĝi videblis kelkaj interesaj domoj kaj preĝejoj en Kaunas, kiujn priskribis ina voĉo en Esperanto. La dua filmo el Litovio estis pri la litova kalendaro, prezentita de la sama Esperanta rakontistino. Ĝi montris kiel festas litovoj la plurajn specialajn festojn de sia kalendaro. La litovoj kristaniĝis pli malfrue ol multaj aliaj nacioj de Eŭropo kaj konservas multajn paganajn tradiciojn.

Je la naŭa horo Stuart formale fermis la kunvenon. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE

IBM Plaza

La 6-an de februaro pli malpli dek ge-ESNY-anoj neformale kunvenis en IBM Plaza. Oni priparolis multajn aferojn, inkluzive la tiu-tagan futbalan matĉegon. ★

– Thomas ECCARDT



Laste transloĝiĝis

Chuck Smith, el Pensilvanio, dum januaro transloĝiĝis al Novjorko kaj loĝas nun kun amiko. Li serĉas kaj laboron kiel programisto de Java kaj



apartamenton malgrandan. Se vi scias pri ebleco aŭ por laboro aŭ por apartamento, bonvolu kontakti Chuck je 917-697-0304. Dankon! ★

– Jim MEDRANO

Intervjuo

Mi lasis IBM Plaza frue, ĉar mi havis rendevuon por esti intervjuata de Christene Browne, kiu preparas dokumentfilmon pri lingvoj por kanada televido. Mi parolis pri Esperanto kaj la movado por internacia lingvo. ★

– Thomas ECCARDT

Blonstein en Brazilo

Jen kelkaj lastatempaj fotoj de nia amiko kaj antaŭa membro Nijl Blonstein, dum li partoprenis en la 5-a Monda Socia Forumo, kiu okazis en Porto Alegre, Brazilo, la 26-an ĝis la 31-a de januaro. Nijl nun loĝas en Brazilo. Jeff Blakeslee informis niin pri la fotoj, kaj trovigis ĉe <http://gxangalo.com/blogo/Forumo.html>. La fotojn faris Jozefo Pacheco. ★

– Jim MEDRANO



Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Februaro 2005

18

ESNY KUNVENO

Susan Polgar prelegos pri sia vivo kiel profesia ŝakisto
Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

Marto

6

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza
(Limdato por kontribuajoj por *Prismo* 142)

ESNY KUNVENO


Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

18

United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

“IBM” Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium



ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Koresponda Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 738-6084

Program-Direktorino
Maki Sano
(212) 614-9184

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuajojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com
© 2005 Esperanto Society of New York

Novjorka Prismo

Numero 141 – Februaro 2005

ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>